

# Fenikso

Revo de Esperanto Nederland

27-a jarkolekto • n-ro 6 | novembro - decembro 2022



La Esperanto-kulturo havas ĉiujn aspektojn,  
kiujn ankaŭ aliaj kulturoj havas.

**Fulmprezento pri Esperanto**



Ron Winteraeken  
estis en Greziljono 8

12

Interview met  
Bert de Wit

14

Column Marc van  
Oostendorp

19

Invito al IFEF en  
Antverpeno



22

Det Koning nova  
kunlaboranto



## Fenikso, Forumo de Esperanto Nederland

Dumonata membrogazeto de Esperanto Nederland  
ISSN 1384-6515

Membroj de Esperanto Nederland ricevas la gazeton.  
La jara kotizo estas € 35,-  
(por samdomanoj €12,50).  
NEJ-anoj pagas € 15,-  
(por samdomanoj € 5,-).

Vidhandikapitoj povas ricevi kasedan version, aranĝitan de Rob Moerbeek. Petu abonon ĉe: [Redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:Redakcio@esperanto-nederland.nl).

### Kunlaborantoj de Fenikso:

Ĉefredaktoro: Foppe-Klaas Hovinga  
Redaktoro: Andries Hovinga  
Korektantoj: Marc Konijnenberg kaj Bert de Wit  
Konsilanto: Ineke Emmelkamp  
[redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)

### Limdato:

Materialo por la sekva numero estas bonvena ĝis la  
1-a de decembro 2022.

### Informoj pri Esperanto:

Ineke Emmelkamp  
Arubastraat 12, 9715 RW Groningen  
([info@esperanto-nederland.nl](mailto:info@esperanto-nederland.nl))  
tel. 050-5718842

### Studosemajnfino/studieweekend:

[studosemajnfino@esperanto-nederland.nl](mailto:studosemajnfino@esperanto-nederland.nl).

### Esperanto Nederland enrete:

Retejo: <https://www.esperanto-nederland.nl>  
Fejsbuko: [facebook.com/esperanto.nederland](https://facebook.com/esperanto.nederland)  
Telegramo: <https://t.me/EsperantoNederland>  
Tvitero: <https://twitter.com/EsperantoNL>

### Sendu viajn kontribuojn al:

[redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl)  
Respondu al artikoloj per maksimume 200 vortoj.  
La redakcio decidas ĉu publikigi tekstojn aŭ ne.

## Estraro

- **Estraro:** [estraro@esperanto-nederland.nl](mailto:estraro@esperanto-nederland.nl)

- **Prezidanto:** Marc van Oostendorp,  
Nederlandse Taal en Cultuur  
Radboud Universiteit Nijmegen,  
Postbus 9103 6500 HD Nijmegen  
[prezidanto@esperanto-nederland.nl](mailto:prezidanto@esperanto-nederland.nl)

- **Sekretario:** Ineke Emmelkamp,  
Arubastraat 12, 9715 RW, Groningen  
[sekretario@esperanto-nederland.nl](mailto:sekretario@esperanto-nederland.nl)

- **Kasisto:** Loes Demmendaal,  
Duikerlaan 160, 2903 AC,  
Capelle a/d IJssel.  
[kasisto@esperanto-nederland.nl](mailto:kasisto@esperanto-nederland.nl)  
tel. 010 2133320

- **Estrarano:** Peter van Noorden  
Tamarixplantsoen 203,  
1702 JD Heerhugowaard  
[petervn@esperanto-nederland.nl](mailto:petervn@esperanto-nederland.nl)  
tel. 06 2261 3249

- **Pri sociaj komunikiloj:**  
[sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl](mailto:sociaj-komunikiloj@esperanto-nederland.nl)

- **Membro-administranto:**  
Koos Scharroo,  
Vaartweg 24G, 8382 EB, Frederiksoord  
[membroj@esperanto-nederland.nl](mailto:membroj@esperanto-nederland.nl)  
tel.06 22413267

Bv. informi pri (ŝanĝoj de) poŝtadreso, telefonnumero,  
retpoŝtadreso, (eks- kaj ali)membraĝo, pagmaniero

### Bankkonto:

IBAN: NL 10 TRIO 0786 8441 67  
nome de Esperanto Nederland,  
Capelle aan den IJssel.

### Eventuala resendadreso/eventueel retouradres:

Esperanto Nederland Ledenadministratie  
Vaartweg 24G  
8382 EB Frederiksoord



## En tiu ĉi numero

4. De la estraro; Esperanto glumarkoj
5. Bonvenon
6. UEA-novaĵoj
7. Aktualajoj kaj testeto
8. Kurso en Francio
9. IJK 2022
10. Verloren van Themaat premio 2022
11. Fulmoprezenti Esperanton
12. Bert de Wit over zijn rozentuin
13. Verklaring van het UK 2022
14. Column Marc van Oostendorp
15. Asocio Nova Familio
16. Angligo de la instruado; Ik ben ontredderd
17. Woorden doen er toe; Luminesk
18. Arkones
19. Invito al IFEF en Antverpeno
20. Revuo-interŝanĝo
22. Nova kreanto por la vortserĉenigmo
23. Vortserĉenigmo
24. Letero al la rusaj soldatoj
25. Nekrologoj pri Corrie Kwantes – Kooy kaj Piet Damman
26. La filoj de l' ŝtonkora homo

### Amsterdama Rondo

“La Amsterdama Rondo” organizas kunvenojn de esperantistoj - ĉiun duan dimanĉon de la monato. Ni renkontiĝas, ĉu fizike, ĉu per ZOOM aŭ ambaŭ samtempe. Ĉiuj estas bonvenaj.

Organizanto:

[laamsterdamarondo@gmail.com](mailto:laamsterdamarondo@gmail.com)

+31 614 240 870 (Peter)

+31 23 5242 643 (Bert)

Vidu: <http://amsterdamo.nl>

## Voorwoord

In Deventer heb ik 27 jaar lang gewoond. We woonden er mooi. Het is een oude stad en door de wandelingen met de honden kende ik elke straat. Toch heb ik maar twee momenten gehad dat ik me er echt helemaal thuis voelde. Het ene moment was dat ik mijn moeder zomaar ergens in de stad dacht te zien. - Het bleek een andere mevrouw te zijn met hetzelfde haar. - Het andere moment was dat iemand vanuit de voortuin luid “Hoi!” riep. - Ik dacht tegen mij - In Friesland riepen we altijd luid “Hoi!” tegen iedereen die we tegenkwamen, tegen jong en oud, bekenden en onbekenden, tegen wandelaars en mensen op de fiets. Zo’n moment van me echt helemaal thuis voelen ervoer ik ook tijdens Arkones in Poznań, waar ik in oktober was. Anjo Amika zong in het Esperanto een lied dat wij samen met onze ouders wel eens zongen, als gebed na het avondeten, meestal op een mooie zomeravond. Het “Hoi!” en het avondgebed maakten onderdeel van mijn cultuur uit.

Iedereen zal andere momenten hebben waarop hij of zij zich helemaal thuis voelt. Helaas zijn veel geuren van vroeger verdwenen. We hebben allemaal een andere achtergrond met een eigen cultuur. Niet veel zijn in de Esperanto-wereld opgegroeid. De meesten van ons hebben deze pas als jongere of volwassene leren kennen. Met elkaar vormen we die. Het is interessant om eens te bedenken waar de Esperanto-cultuur uit bestaat, wanneer we met andere esperantisten zijn of met Esperanto bezig zijn.

In dit nummer komen we ook van alles tegen wat met onze Esperanto-cultuur te maken heeft: de bijeenkomsten, de postzegels die Loes Demmendaal naar Wenen opstuurde, de tijdschriften en de oude boeken. - Verstandig denk ik dat Federico Gobbo nieuwe boeken uitstalde tijdens de speakdating, omdat die voor niet-esperantisten aantrekkelijk zijn, maar wij leggen graag de oudere boeken op de tafels, omdat ze een onderdeel van onze cultuur vormen. - Andere onderdelen van onze cultuur zijn de Verloren van Themaat-prijs, Greziljono, IJK, de Esperanto-ster en vlag (niet-omgekeerd). Uiteindelijk maakt ook Fenikso zelf onderdeel van onze Esperanto-cultuur uit. Hopelijk geniet je er weer van.

We wensen je veel leesplezier toe.

*Foppe-Klaas Hovinga*

*Hoofdredacteur*

## Foto sur la kovrilo

Katalin Kováts (kun mikrofono) estas instruisto kaj kreinto de instrumaterialoj kaj ankaŭ membro de Esperanto Nederland. Dum Arkones prof. Ilona Koutny (kun blua veŝto), profesorino pri interlingvistikaj studoj ĉe Universitato Adam Mickiewicz (UAM) en Poznań, plurfoje esprimis sian admiron por ŝi kaj dankis ŝin pro la grava laboro kiun ŝi faras por la Esperanta instruado. Arkones estas ĉiujare kultura kaj arta esperantista aranĝo en Poznano (Pollando). En tiu ĉi numero de Fenikso vi legas raporton pri ĝi.



## De la estraro

La estraro kunvenis la 10an de septembro en Utrecht. Rob Groeneveld, kiu protokolas niajn kunvenojn, ĉeestis. Estis agrable denove fizike kunveni.

### Gazetoj de FLE

En septembro 2022 ni ricevis peton de la Koninklijke Bibliotheek. En 2011 la biblioteko ekbitigas grandskale gazetojn kiuj estis eldonitaj en Nederlando. Pere de Delpher ([www.delpher.nl](http://www.delpher.nl)) ĉiuj povas legi tiujn gazetojn. Ili ricevas subvencio de 'Metamorfoze', la Nacia Programo por la konservado de la Papera Heredaĵo. ([www.metamorfoze.nl](http://www.metamorfoze.nl))

La gazeto 'Laborista Esperantisto – orgaan van de Bond van arbeiders-esperantisten FLE – apartenas al la elektitaj gazetoj. Ĝi estos bitigita ĝis inkluzive la jaron 1968. En 2024 vi povos trovi la dokumentojn en Delpher.

La KB nun demandas nin doni la permeson fari tiun bitigon. Por gazetoj eldonitaj post 1952 restas la aŭtoro rajto ĉe la eldonisto, ili petas nin doni la permeson por bitigi ĉiujn numerojn ĝis inkluzive 1968. Ni tuj donis nian konsenton kaj baldaŭ la prezidanto subskribos la necesajn paperojn! Bona kaj interesa projekto!

**Konkluda kunveno de GEK-kongreso** kiun Esperanto Nederland devas organizi, ne povis okazi fine de septembro. Ni ŝovis ĝin al nova dato en novembro. La datoj nun estas la 25an, 26an kaj 27an de novembro 2022.

**Drongo** nun estas pli kaj pli platformo por multilingveco. Bert de Wit proponis ke Esperanto Nederland eble povas prepari tekston por la rubriko 'In de etalage'. Marc van Oostendorp kontaktos Drongo-n.

## Esperantaj glumarkoj transdonitaj al Vieno

Meze de septembro 2022 mi vojaĝis al la Internacia Esperanto Muzeo en Vieno (IEMW). Mia patro heredis grandan kolekton de esperantaj glumarkoj de kamarado Lakemond el Apeldoorn en la sepdekaj jaroj. Li arde plu kolektis ĝis 1997, kiam mi transprenis la kolekton. Lastjare Esperanto Nederland ricevis du grandajn sakojn kun esperantaĵoj. Kun mia fratino Inge, ni dum pluraj monatoj elsarkis ĉiujn glumarkojn kaj aldonis tiujn al la kolekto kiuj mankis.

Mi speciale vojaĝis al la IEMW por transdoni 5 albumojn kun la laŭdatan kolekton de esperantaj glumarkoj. La plej aĝa glumarko estas de 1906, la lasta de 2021. En la 10a de oktobro ni sendis la ceterajn 12 albumojn kun glumarkoj kiuj estas laŭlande kaj laŭteme ordigitaj. Ni ankaŭ sendis diversajn foliojn kun glumarkoj. IEMW ankaŭ interesiĝas pri esperantaj



filatelaĵoj, kartoj, ktp. La tuta kolekto de filatelaĵoj kaj aliaj esperantaĵoj sume nombras 23 albumoj. Mi provos kunmeti ankaŭ albumon por nia arĥivo ĉe IISG kaj trovis novan hejmon por la duoblaĵojn ĉe Elf-Arek, la asocio por kolektantoj.

*Loes Demmendaal*



**La ĝenerala kunveno de Esperanto Nederland** okazos sabaton, la 10an de junio 2023. 10.30 h en Utrecht, en laejo Kargadoor. En la unua numero de 2023 vi trovos la oficialan tagordon. Certe tiam vi legos ankaŭ la posttagmezan programon. Lunĉon ni nun ne prizorgas. En apudaj butikoj vi havos eblecon aĉeti mem viajn buterpanojn!

### Malnovaj libroj

Ne nur Nederlandanoj legas tiun rubrikon en Fenikso aŭ trovas la liston en la retejo. Herman el Belgio mendis la libron 'Fabeloj' por amiko en Irano! Partoprenantoj de la studosemajnfino mendis plurajn librojn! Kiam mia kesto en la koridoro estos malplena?

### Studosemajnfino 2023.

Ĉio fariĝas pli kosta. Ni altigas la kotizon per 5 eŭroj. Membroj pagos 80 eŭrojn, ne-membroj 90 eŭrojn. Espereble sufiĉas. La prezoj restas malaltaj. Dank' al kelkaj partoprenantoj kiuj pagas iom pli! Ni kore dankas ilin.

**Lokaj Esperanto-kunvenoj** okazas en Zutphen kaj Vlissingen. Novaj grupoj estas bona iniciato de (ne)membroj. La venonta estrarkunveno okazos la 4an de februaro, denove en Utrecht.

*Groningen, la 3an de oktobro 2022*

*Ineke Emmelkamp, sekretario*



## Bonvenon!

Ĉifoje estas tri novaj membroj. La unua estas Jan van Knobelsdorff uit Zoetermeer. Li tuj mendis la gramatikan libron, verkitan de Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries. La dua nova membro, kiun ni bonvenigas, estas Matthijs Otterdijk el Schiedam. Gramatika libro estas surfoje al li! La tria nova membro partoprenis al la studosemajnfino kaj decidis membriĝi. Ŝi nomiĝas Anne-Marie Hoeben-Wouters kaj loĝas en Lage Mierde. Ŝi partoprenis la studosemajnfino kaj tuj poste decidis membriĝi. La gramatikan libron ŝi tuj kunportis. Kaj krome, ŝi pretis veturi al la stacio Almelo-de Riet por akcepti la trajnvojaĝantojn kiuj partoprenis al la studosemajnfino!

Mi kore bonvenigas tiujn tri membrojn.

Novaj membroj povas senpage ricevi la gramatikan lernolibron de Roel Haveman kaj Arjen-Sjoerd de Vries. Nur sendokostojn vi pagas. Ĉu vi jam mendis la libron? Ankaŭ se vi membriĝis antaŭ kelkaj jaroj vi povas mendi la libron.

Jan, Matthijs kaj Anne-Marie: vi estas bonvenaj partopreni la studosemajnfinojn. Bona okazo renkonti aliajn homojn kiuj lernas Esperanton.

Deze keer drie nieuwe leden: De eerste is Jan van Knobelsdorff uit Zoetermeer. Hij heeft het

grammaticaboek van Roel Haveman en Arjen-Sjoerd de Vries al besteld.


Het andere nieuwe lid is Matthijs

Otterdijk uit Schiedam. Een grammatica-boek is al naar hem onderweg! Het derde nieuwe lid nam deel aan het studieweekend en besloot meteen daarna om lid te worden. Het is Anne-Marie Hoeben-Wouters uit Lage Mierde. Ook zij nam meteen een grammatica-boek mee. Bovendien heeft zij tijdens het studieweekend deelnemers opgehaald vanaf station Almelo-de Riet! Ik heet deze drie nieuwe leden van harte welkom!

Iedereen die lid is van Esperanto Nederland kan een gratis exemplaar van het grammaticaboek van Haveman-de Vries bij mij bestellen! Je betaalt alleen de verzendkosten!

Jan, Matthijs en Anne-Marie, jullie zijn van harte welkom om deel te nemen aan een studieweekend. Een leuke en leerzame bijeenkomst. En tegelijkertijd een gezellig weekend om kennis te maken met andere Esperantisten.

*Ineke Emmelkamp,  
sekretario/secretaris  
18 oktober 2022*



### Over het boek:

"Esperanto, Grammatica met Oefeningen"

ISBN: 9789062831449

Prijs eerder bij [Bol.com](https://www.bol.com): € 64,90

Prijs bij [UEA](https://www.uea.nl): € 30,00

Voor nieuwe leden gratis.

## Pasinta studsemajnfino oktobro 2022

Ekde 14-an ĝis la 16-an de oktobro okazis nia studsemajnfino.

Dum ĉi tiu studsemajnfino ĉirkaŭ tridek lernantoj lernis la lingvon, ĉiu je sia nivelo. Estis kvar lernogrupoj. La instruistoj estis: Bert de Wit, Paweł Fischer-Kotowski, Geomar Martínez Pérez kaj Roel Haveman. La organizantoj estis Ineke Emmelkamp, Lilian van der Burgt kaj Marieke de Haas

En la venonta numero de Fenikso vi legos pri la spertoj dum ĉi tiu studsemajnfino.



*Supren: Paŭzo por la organizantoj: Lilian van der Burgt, Marieke de Haas kaj Ineke Emmelkamp.*



*Denove la manĝaĵoj kaj apetitivaj aĵoj estis tre bone prizorgataj. Foto: Heleen van Reep*



## Premio Deguĉi al Osioka Taeko

Per decido de la Estraro de UEA, la Premio Deguĉi de la jaro 2022 estas aljuĝita al: Osioka Taeko. Osioka Taeko naskiĝis la 21-an de novembro 1948 en Hiroŝimo en Japanio kaj aktivis en sama urbo. Ŝi estas esperantistino kaj aktivulino por paco, virinoj, homaj rajtoj kaj kontraŭ nukleaj armiloj. De jardekoj ŝi aktivis por Esperanto kaj paco.



En Montrealo, frata urbo de Hiroŝimo, la 5-an de aŭgusto 2022, vespere de vendredo antaŭ la komenciĝo de la UK, sonoris la "Paca Sonorilo" en la Japana Ĝardeno de la Montreala Botanika Ĝardeno, kondolence al la viktimoj de la atombomba tragedio. Sekvis minuto da silento, koincidante kun la momento, kiam la atombombo estis ĵetita sur Hiroŝimo matene de la 6-a de aŭgusto (japana horo) antaŭ 77 jaroj (en 1945).

La Premio Onisaburo Deguĉi distingas meritajn agantojn, kiuj longtempe laboras per Esperanto, por monda paco kaj homara feliĉo, konforme al la idearo de D-ro Zamenhof kaj la instruoj de religia gvidanto de Japanio, Onisaburo Deguchi (Deguĉi).

Fonto: Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 1059

## UEA eksigis la ĉefdelegiton en Rusio

La estraro de UEA decidis "provizore ne renomumi ĉefdelegiton en Rusio". Tio signifas, ke la nuna ĉefdelegito Svetlana Smetanina perdas sian postenon. Ŝi estis forte kritikata pro siaj komentoj pri la milito en Ukrainio. Laŭ estraro de UEA la komentoj de Smetanina subtene al militaj agoj ne konformas al la statuto de UEA kaj damaĝas la publikan bildon de la asocio.

Antaŭe Loes Demmendaal, estrarano de Esperanto Nederland kaj ĉefdelegito por Nederlando anoncis sub artikolo de Libera Folio: "Se la estraro ne eksigis la Rusian ĉefdelegiton ĝis la fino de septembro 2022, mi eksigis kiel ĉefdelegito por Nederlando"

Fontoj: Libera Folio, 13-a kaj 30-a de aŭgusto 2022 (kaj komento)

## Diplomoj pri Elstara Agado

En la solena malfermo de la 107-a UK en Montrealo estis anoncita la disdono de 12 diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado por la jaro 2022.

Kadre de Elstara Agado ricevas diplomon i.a.:

- Robin Van der Vliet (Nederlando) pro la reta agado en Esperantujo, inkluzive la tradukon en Esperanton de la furora poŝtelefona apo Telegram, pro la traduka kunlaboro por la versio en Esperanton de Wordpress, pro la kunlaboroj kadre de Komputeko, Vikidatumoj, Vikipedio kaj aliaj retaj agadoj, ĉefe kadre de Fonduso Instigo;
- Klaus Leith (Germanio), karmemore, pro la agado kiel gvidanto de la Komisiono pri Eŭropa Agado de UEA, interalie kadre de la informagado ĉirkaŭ la Konferenco pri la Estonteco de Eŭropo, de Eŭropa Unio.

Aliaj ricevantoj de tiu ĉi diplomo estas: Loka Kongresa Komitato (LKK) de la 107-a UK (Kanado), Pola Retradio (Pollando), Adonis Saliba (Brazilo), Alexandrine Omba (D. R. Kongo) kaj Miora Rasoharinaivo (Madagaskaro), Ĉielismo Wang Tianyi (Ĉinio) kaj Povilas Jegorovas (Litovio).

Kadre de Arta Agado ricevas diplomon i.a.:

- Ionel Oneț (Nederlando/Rumanio) pro la kontribuoj tradukaj kaj eldonaj al la E-literaturo kaj pro la longtempa servado al la Libroservo de UEA.

Aliaj ricevantoj de tiu ĉi diplomo estas:

Zdravka Boytcheva (Luksemburgo/Bulgario), Joel Muhire (D. R. Kongo) kaj Wally Du Temple (Kanado)

## La liberpensula frakcio de SAT

Ekde 1921, la liberpensuloj agadis ene kaj ekstere de SAT. La historio de la frakcio konis germanan periodon kaj poste alilandaj homoj altivis. En 1949, A. Roosing Sr., Prof. Lorentzlaan 37, Zeist, Nederlando estris la liberpensulan frakcion.

Mi ne trovis arkivojn pri li. Ĉu iu havas informojn pri li? Vi povas kontakti min: dominique.simeone@yahoo.fr aŭ telefone vidu: liberpensula frakcio kontakto.

Sr.o Dominiko Simeono



## Belartaj konkursoj de UEA en 2023

En 2022 la nombro da konkursaĵoj ricevitaj por la Belartaj Konkursoj superis atendojn: 173 verkoj. Vi nun povas sendi viajn verkojn por la Belartaj Konkursoj de la jaro 2023. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al aliĝo al la UK. La konkursaĵoj devas esti neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo, krom en la branĉo Infanlibro de la Jaro. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo aŭ subbranĉo. Estas la kategorioj:

- Poezio,
- Prozo,
- Mikronovelo,
- Teatraĵo,
- Teatraĵo, subbranĉo Monologo (unupersona teatraĵo) aŭ Skeĉo (unu- aŭ plurpersonaj),
- Eseo,
- Infanlibro de la Jaro kaj
- Kantoteksto.

La absoluta limdato por ricevo de konkursaĵoj estas la 31-a de marto 2023.

Pli da informo:

- La anonco: <https://mallonge.net/226BKUEA>
- La reguloj: <https://mallonge.net/226bkr>

## Lingva testeto


Tiu ĉi testeto konsistas el du demandoj. Ĉu vi scias la ĝustajn respondojn?

- 1) Por kio konstruistoj uzas *tegolojn*?
  - a. Por konstrui murojn
  - b. Por kovri tegmentojn
  - c. Por ornami surfacojn en kuirejo kaj banĉambro
- 2) Kion signifas la prefikso *retro*-?
  - a. Denove
  - b. Malantaŭen
  - c. Malmoderna

Vi povas trovi la respondojn al la testo sur paĝo 27.

*Arjen-Sjoerd de Vries*

## Universala Kongreso en Torino 2023



Venonta jaro la Universala Kongreso estos pli proksima ol tiu ĉi jaro. Ĝi okazos en Torino, Italio.

La 108-a UK  
Torino — Italio  
29a de julio — 5a de aŭgusto  
2023  
Kongres-kotizoj por  
Nederlando (A-lando) estas ĝis  
31-a de decembro:

- individua membro de UEA  
190 euro
- Ne individua membro de  
UEA: 240 euro



Por komitatanoj, kunuloj, junuloj kaj handikapuloj la kotizoj estas malpli.

Pli da informo kaj por aliĝi: <https://uea.org/kongresoj/UK>  
Facebook grupo: <https://www.facebook.com/uktorino2023/>



## Dektaga Maratona Esperanto-Kurso en Greziljono

De Ron Winteraeken

La kastelo de Greziljono, situanta en la franca urbeto Baugé-en-Anjou, estas batanta koro de la Esperanta movado ekde 1952. Esperantistoj el diversaj landoj kunvenas tie por lerni Esperanton, tradukadon, por renkontiĝi, kanti, teatri, interŝanĝi scion kaj tutsimple pasigi bonan tempon. Kadre de mia studo, mi havas la ŝancon kontribui al la organizado.

### La historio

La Esperanto-Kulturdomo estas fondita de Henri Micard. Post akcidento en ĉasado kiam li estis juna, li pene sukcesis paŝi, sed tio, kio karakterizis Micard, estas lia luktema menso kaj lia rifuzo akcepti malvenkon. Li volis paŝi kaj malgraŭ longaj jaroj de tuta nemovebleco, li ja sukcesis paŝi. Li fariĝis esperantisto en 1921 kaj iĝis instruisto kaj aktiva sindikato. Ekde 1936, li organizis la Somerajn Lernejojn de la Grupo de Esperantistaj Edukistoj kaj en 1951 venis al li la ideo aĉeti domon anstataŭ lui diversajn lokojn. Li gvidis la Kulturdomon preskaŭ ĝis sia morto en 1966.



“En mia kastelo, la esperantistoj el la diversaj landoj sentas ke ili estas en sia propra bieno. Por mi estas la plej bela rekompenco.”

*Henri Micard*

Postsekvante, Pierre Babin gvidis la Kulturdomon dum trideko da jaroj. Li jam partoprenis la inaŭguron de Greziljono en 1952 kaj instruis Esperanton ekde la posta jaro. Li eldonis lernolibron por praktikantoj kaj faris perkorespondan kurson, direktoris dum kvardek jaroj la revuon Kulturaj Kajeroj kaj prezidis Francan Esperanto-Instituton (1989-1998). Li forpasis en 2015.



Greziljono multe kontribuis al la Esperanta kulturo, ne nur per siaj libroservo kaj biblioteko sed ankaŭ per siaj revuoj, lernolibroj kaj kursoj. En 2018, la Teknika vortaro de Greziljono de Frédéric Lauriol ricevis la OSIEK-premion. La kastelo gastigis multajn esperantistajn eventojn: kongresojn kaj post-kongresojn de naciaj kaj internaciaj asocioj. La Kulturdomo estas grava ankaŭ por la urbo Baugé. Dum sia ekzistado ĝi bonvenigis dekmilojn da vizitantoj. En 1959 la strato laŭ kiu oni atingas Greziljonon, eknomiĝis “rue du Docteur Zamenhof”.

### Greziljono nuntempe

Daŭre la Kulturdomo organizas ĉiujare diversajn Esperantajn kursojn, interŝanĝojn de scioj, kunvenojn kaj ankoraŭ multe pli da eventoj. François Lo Jacomo, matematikisto, komputisto kaj lingvisto, nun prezidas la Kulturdomon. Menciindaj kontribuantoj estas interalie Bert Schumann, René Jelenc, Jannick Huet-Schumann kaj Pierre “Ŝtonĉjo” Soubourou. La Kulturdomo montris, ke ĝi ludas gravan rolon en la Esperanta movado, sed la bonteno de la konstruaĵo kaj bieno estas granda defio. Por ekhavi sufiĉe da enspezoj, oni regule ludonas la kastelon al grupoj kiel familioj aŭ firmaoj.

Ankaŭ trovi novajn volontulojn gravas por plibonigi la kastelon. Diversaj planoj jam sukcese efektiviĝis, kiel la adapto de ĉambro por personoj kun limigita movkapablo kaj la renovigo de la lavdomo. Ŝtonĉjo kreis projekton sub la nomo IAKA (Ideo-Agordo-Kunlaboro-Aklamo) por ke homoj kunigu siajn fortojn ĉe tiaj projektoj. Vizitu la retejon por pli da informoj: <https://sites.google.com/view/iaka-greziljono>

Retejo: <http://gresillon.org/>



## Maratona Esperanto-Kurso

En julio mi partoprenis la dektagan Maratonan Esperanto-Kurson, kiu estis bona okazo por plibonigi mian nivelon de Esperanto kaj renkonti aliajn esperantistojn. La vetero estis varmega ĝis "la birdoj preskaŭ falis de la tegmentoj", sed la etoso estis superba, dank' al la afablaj homoj sed ankaŭ dank' al la belega ejo. La kastelo estas ĉirkaŭita de belegaj arbaroj kaj kampoj kaj dum la tago oni povis aŭdi centojn da griloj. Dum la nokto oni povas vidi la Laktan Vojon, kio estas malofta en Nederlando.

Alex Humet, mia instruisto, gvidis la kurson laŭ agrabla metodo kaj mi multe lernis dum la lecionoj. Oni preskaŭ ne krokodilis, ĉar miaj kunlernantoj estis el diversaj landoj, kio fakte estas tre bona.

La lecionoj okazis matene kaj posttagmeze, sed inter kaj post la lecionoj estis multe da tempo por ripozi, manĝi, babilo, ludi

tabulludojn kaj malkovri la belegan ĉirkaŭjon.

Ĉiutage okazis prelegoj aŭ seminarioj kiujn la partoprenantoj povis prezenti. Mi speciale ĝuis la interesan prelegon de Paweł Fischer-Kotowski pri la historio de la Esperanta movado kaj de la Universalaj Kongresoj. Meze de la semajno estis tuttaga ekskurso dum kiu ni vizitis du kastelojn en la valo de la Luaro: Azay-le-Rideau kaj Langeais. Je la fino de la kurso mi pretigis min por la B1-ekzameno.

Konklude, mi povas diri ke la kurso estis bonega sperto kiun mi forte rekomendas.

Agendo: <http://gresillon.org/agendo>

La unua teksto estas bazita sur tekstoj el Greziljono. La fotisto de la klaso estas ne konata.



## KER ekzamenoj

En la lasta semajnfino de novembro la KER-ekzamencentro de UEA denove okazigos Tutmondan Ekzamentagon.

La ekzamenoj okazos je ĉiuj KER-niveletoj, B1, B2, C1 kaj eĉ je C2.

Superrigardo de la diversaj lokoj kie oni okazigos ekzamensesiojn aperas en:

Eventa Servo:

<https://eventaservo.org/o/KER>

Kaj en la paĝaro de

Edukado.net, sesioj kaj aliĝilo:

<https://mallonge.net/226kerexz>

## IJK de Esperanto en Westelbeers

La 20-an ĝis la 27-an de aŭgusto 2022 okazis la Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Westelbeers.

La IJK okazis en Westelbeers de la 20-a ĝis la 27-a de aŭgusto 2022. Ĉar tio ne estas tro for de mia domo, mi iris jaŭdon vespere por viziti ĝin. Kelkaj junuloj havis kunvenon, aliaj ekzercis teatraĵon kaj alia grupo ludis. Mi serĉis Roĉjon (la prezidanto de NEJ) kaj trovis lin metantan seĝojn por la vespera internacia vespero.

Do mi komencis helpi ĉar tiel mi povis babilo iomete kun li. Je la oka komenciĝis la vespera programo. Sur la podio oni kantis, muzikumis, dancis, legis poemojn, rakontis historiojn k.t.p. Mi tre ŝatis la etoson, babilis ankoraŭ iomete kun kelkaj konatoj kaj bedaŭrinde devis foriri poste. Entute estis 233 partoprenantojn el 30 landoj.

Legu ankaŭ:

<https://mallonge.net/226ijk2022>

An Olijslagers



Fotoj: Ivo Miesen



## Verloren van Themaat premio 2022

La ĵurio de la Verloren van Themaat-premio deziras ricevi kontribuojn por aljuĝi la premion pri 2022. Sendu viajn proponojn ĝis la 15a de januaro 2023 al Ineke Emmelkamp, Arubastraat 12, 9715 RW Groningen aŭ sekretario@esperanto-nederland.nl

Dum la lastaj jaroj la ĵurio ne aljuĝis la premion pro manko de bona materialo. Ĉu vere ne estas bonaj artikoloj, intervjuoj, tekstoj?

Jen la reguloj:

### Huishoudelijk reglement - artikel 26

1. De vereniging kent een mediaprijs, die de naam "Verloren van Themaat-prijs" draagt en die jaarlijks kan worden toegekend aan de persoon die in een jaar de beste informatieve bijdrage over het talenprobleem en/of Esperanto heeft doen publiceren in landelijke, regionale of sociale media.
2. De toekenning geschiedt met redenen omkleed door een deskundige jury bestaande uit 3 personen, die door het bestuur worden benoemd voor een periode van 3 jaar.
3. Kopieën van de betreffende bijdrage, voorzien van de naam van het medium en de datum van publicatie alsmede van de naam van de auteur, dienen te worden ingezonden aan het secretariaat van de vereniging voor 15 januari van het volgende jaar.
4. Het bedrag van de prijs is vastgesteld op € 250,-
5. De bekendmaking van de prijswinnaar geschiedt tijdens de algemene vergadering.

*Ineke Emmelkamp, sekretario Esperanto Nederland*




Foto: Canva

## Willem VERLOREN VAN THEMAAT

(19a de aŭg. 1931 Nijmegen – 6-a de dec. 1996 en Amsterdamo). Zaruŝtra de Nietzsche (1977, el la germana) kaj de parto de la poezia Nederlanda Antologio, kies precipa kunredaktoro li estis (1987).

Studinte Esperanton ĉe Sigismundo Pragano en la Amsterdama Universitato (1955-59), li doktoriĝis pri matematiko, fako pri kiu li estis delegito ekde 1961; en 1993 lia delegiteco ŝanĝiĝis al interlingvistika kaj amsterdama. Li regule membris en Societo Zamenhof.

Profesie esploristo pri scienco, Verloren van Themaat vaste artikolis en sciencaj revuoj ekstermovadaj kaj en Esperanto - periodaĵoj, precipe pri temoj sciencfilozofiaj, interlingvistikaj kaj literaturaj. Li kun-iniciatis kun H. Tonkin la inkluzivigon de Esperanto-rilataj eroj en la Bibliografion de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj.

El liaj grandnombraj verkoj elstaras La Akvariinfanoj (1976), romano pri ekstertera vivtenado de fetoj, la studo La Vicordo de la Frazelementoj en Esperanto (1973), la eseo Esperanto: Ideologio kaj Kulturo (1996), la traduko de Tiele Parolis

Li opiniis aparte pluginda kampo la tradukadon de originalaj Esperantaj literaturaĵoj: aperis liaj nederlandigoj de La Infana Raso de William Auld (Het Kinderras, 1982) kaj de 16 poemoj en la antologio Zeg, Luister Eens (1981); lia bibliografio de Esperantaj beletraĵoj tradukitaj en aliajn lingvojn aperis ĉe UEA. Aktiva en Esperantlingva Verkista Asocio, en la lastaj ses jaroj li servis kiel ties sekretario.

La asocio Esperanto Nederland, kies rebat-servon li estris, fondis la omaĝan premion Verloren van Themaat, donotan ĉiujare al la esperantisto kiu atingis plej trafan prezenton de Esperanto en amaskomunikiloj.

*El: Willem Verloren van Themaat - Wikiwand  
Ineke Emmelkamp*



## Fulmoprezenti Esperanton

La 29-an de septembro estis la Eŭropa Tago de la Lingvoj. En OBA Café Oosterdok en Amsterdam oni festis tion per fulmoprezento. Dum mallongaj 'fulmoprezentoj' vizitantoj povis sperti la riĉecon de lingvoj en Eŭropo. Unu el la prezentantoj estis Federico Gobbo, kiu prezentis Esperanton.

De: Federico Gobbo

**Se vi havas je dispono 10 minutojn, malgrandan tablon por ekspozicieto, ĉirkaŭe aliaj tabletoj kun aliaj lingvoj, kiel organizi fulmoprezenton (mi tradukas tiel "speaking") de Esperanto?**

Mi volas kunpartigi mian respondon per mia sperto. La nura deviga afero kiun la organizantoj postulis estas la flago. Ĉiu lingvo (aŭ lando) havas flagon -- interese, la nederlandan signolingvon oni identigis per foto de signanto, ĉar ne ekzistas specifa flago.

La verdan flagon ĝenerale oni ne konas; laŭ kutima uzo de la verda koloro tiela, se mankas skribaĵoj en Esperanto, oni supozas, ke temas pri Islama lando en centra Azio. Eble la Unua Libro kies kovrilo estas ĉefe en la rusa povas misvoĵigi homojn. Tamen, montri, ke la debuto de Esperanto pasis tra maldika broŝuro nepre vekas atenton. Same la jaro: 1887. Homoj ofte supozas, ke Esperanton oni unue proponis en la 1950aj por la bona funkciigo de UN. Almenaŭ hieraŭ.

La ĉeesto de originalaj kaj tradukitaj kulturaĵoj flank' al flanke montriĝis efika strategio: komiksoj kaj muzikaĵoj atestas ne nur, ke Esperanto vivas, sed ankaŭ, ke ĝi ne estas polvokovrita, sed male mojosa.

Tute hazarde, junajn homojn altiris la kovrilo de Kontakto kun Arnold Schwarzenegger. Oni demandas min ĉu li parolas aŭ subtenas la lingvon; mia respondo estis, ke homoj kiuj parolas Esperanton ne devige parolas nur \*pri\* Esperanto sed ankaŭ pri la mondo ĝenerale. Aparte pri tutmondaj temoj.

Ĉiuj ekkomprenas la esprimon "klimata aktivulo" sen bezono de helpo. Per folietoj mi montris, ke per 5 vorteroj: klimat-, aktiv-, -ul-, -a, -o oni povas formi, kvazaŭ ludante, sufiĉe multajn vortojn: klimato, aktiva, ulo, ktp. Tiun klarigon mi faris en aliaj lingvoj -- homo kiuj interesiĝas ĝenerale jam plurlingvemas. Kaj fino de la gramatiko. 3 minutojn maksimume mi dediĉis al tio. Ĉion alian mi



klarigis senpere en Esperanto per simplaj frazoj, akompanataj de gestoj. Tiel ili spertas la kompreneblon de Esperanto sen eksplicita klarigo.

Kiam oni demandis min pri vortaroj, mi montris la kanji-vortaron publikigitan danke al la japanaj esperantistoj, kiu laŭ mi estas tipografie la plej bela eldono de E-vortaro.

Mia nura konsilo estas montri konkretajn kulturaĵon kiujn vi ŝatas, kaj doni donacete flugfoliojn aŭ libreton kun la bazaj informoj -- mi havis la ŝlosilon de Esperanto Nederland, kiun ĉiu nederlandparolanto aprezis.

Surprize, malofte mi montris retejojn per mia telefono: Pasporta kaj Eventa Servoj estas la plej efikaj. Foje Vikipediaj paĝoj pri landaj asocioj ankaŭ utilas. Sed konkretaj aĵoj atestas, ke temas pri konkreta lingvo. Fakte, la libro eldonita de Oxford University Press nerekte diras, ke Esperanto estas inda je esplorado akademie.

Jen kion mi volas diri, surbaze de la bela memoraĵo de la hieraŭa vespero, kiun fotis Barbara Philipp, antaŭ ol forgesi detalojn



*Bert de Wit is zeer actief als Esperantist. Om slechts een paar activiteiten te noemen die hij doet en gedaan heeft: in 1982 schreef hij al een Esperanto-cursus, Praktika Kurso de Esperanto, uitgegeven door FLE. Hij medeorganiseert en begeleidt de maandelijkse Amsterdama Rondo, hij is een van de vaste leraren tijdens de studieweekenden van Esperanto Nederland. En tot slot voert hij de taalkundige eindcontrole uit van Fenikso. Maar naast Esperanto heeft hij nog een andere grote hobby: het onderhouden van zijn eigen rozentuin. Hieronder volgt het interview dat het Haarlems Dagblad met hem hierover had.*

## 'Een roos die niet geurt, is een klap in 't gezicht'

Tuintrots: Meer dan 80 soorten rozen in de grote tuin van Bert de Wit.

© Foto's United Photos/Toussaint Kluiters  
Judy Nihof / 19-08-22 om 11:00, Aerdenhout

De liefde voor tuinieren zit diep bij Bert de Wit uit Aerdenhout. Vandaar dat hij geen huis met een tuin wilde, maar een tuin met een huis. „Nou, dat is gelukt.”

Meer dan tachtig verschillende soorten rozen heeft Bert de Wit in zijn grote tuin aan de Houtvaarkade in Aerdenhout. De 72-jarige bioloog is dol op rozen. Maar ze moeten wel geuren. Anders heeft hij ze liever niet in zijn tuin. „Een roos die niet geurt, is een soort slag in m'n gezicht.”

In juni was de tuin volgens de Aerdenhouter op zijn mooist. De droogte van de afgelopen weken heeft de planten geen goed gedaan.

„De tweede bloei van de rozen komt minder goed op gang.”

De Wit's voorliefde voor rozen begon toen hij als klein jongetje zijn neus stak in een roos aan een struik die bij de buren stond. Die zalige geur is hem altijd bijgebleven. Dat hij groene vingers heeft, ontdekte hij in de zomervakanties als hij logeerde bij zijn oom en tante. Zij hadden een grote tuin in Voorburg waaraan ze de handen vol hadden. Dan hielp hij graag mee.

### Grasveld

De Wit kocht zijn huis in 1984. Hij viel als een blok voor de enorme tuin. „Ik was niet op zoek naar een huis met een tuin, maar naar een tuin met een huis. Nou, dat is gelukt.”

De tuin zag er destijds heel anders uit dan nu. De vorige eigenaar had een aantal borders aangebracht, maar verder was het één groot grasveld. De Wit heeft er een weelderige, dichtbegroeide tuin van gemaakt. „Ik vind het mooi hoor, een baroktuin met alles in vakjes, maar zo'n figuur ben ik niet. Voor mij hoeft een tuin niet netjes en aangeharkt te zijn.” Toch zit er wel enig systeem in. „Ik groepeer de rozen een beetje op kleur. Geel-oranje, wit-geel, wit-lichtroze, donkerrood-paars.”

Hoewel de roos favoriet is, heeft De Wit ook andere bloemen in zijn tuin gezet, zoals dahlia's en fuchsia's. Ook ontbreekt het niet aan bomen. De imposante den stond er al toen hij er kwam wonen. De Aerdenhouter vermoedt dat de den is



*Bert de Wit opent zijn tuin soms voor bezoekers.*

geplant in 1952, toen het huis is gebouwd.

De appelbomen heeft hij zelf geplant. De Wit houdt van vogels en ziet ze graag in zijn tuin, maar niet in de appelboom die vol zit met Summerred-appels. Daarom heeft hij er cd's in gehangen. „De cd's bewegen waardoor ze lichtflitsen geven. Daar schrikken vogels van.”

### Honingzwam

Toen hij het huis betrok plantte hij diverse rozensoorten. Na een jaar of vijf bezweken sommige soorten ineens. „Ze waren zo mooi en plotseling: wég!” De boosdoener: honingzwam. Sindsdien kiest hij zoveel mogelijk rozensoorten uit die resistent zijn\*. „Rozensoorten die gevoelig zijn voor honingzwam zet ik in containers voordat ik ze plant. Dat werkt goed.”\*\*

De Aerdenhouter ging zeven jaar geleden met pensioen na onder meer werkzaam te zijn geweest als adviseur bij het Planbureau voor de Leefomgeving in Den Haag. „Ik ben bioloog maar heb eigenlijk altijd gewerkt vanachter een bureau.” Hij vond het een verademing om in zijn vrije tijd buiten bezig te zijn met planten. „Tuinieren is mediteren met je handen.”

Behalve een grote tuin bij zijn woning ontfermt De Wit zich ook nog over een grote tuin bij de volkstuinvereniging met de toepasselijke naam Nooit Rust. De Wit geeft toe dat de beide tuinen hem veel werk opleveren. „Maar het houdt je jong.”



Eigenlijk is het een wonder dat hij tijd overhoudt voor het geven van Nederlandse les aan statushouders en het doceren van Esperanto, een internationale taal die in 1887 werd bedacht.

Regelmatig bezoekt De Wit tuinen in binnen- en buitenland. „Er wordt gezegd dat je voor tuinen in Engeland moet zijn, maar in Duitsland, Frankrijk en Italië heb je ook heel mooie tuinen.” Zelf stelt hij zijn tuin ook wel eens open voor bezoekers. Dan vertelt hij honderduit over zijn planten. Al ging dat de laatste keer ten koste van zijn stem. „Ik zou de volgende dag zingen in een koor, maar dat kon niet doorgaan. Ik had teveel gepraat.”

### Drie vragen aan Bert de Wit

*Wat is uw grootste tuinblunder?*

„Ik heb ooit een door buxusvuur aangetaste buxus geruimd. Als alternatief heb ik toen een Ilex crenata (Japanse hulst) geplant en een Lonicera nitida (struikkamperfoelie).

Die laatste doet het best, maar de Ilex crenata was geen succes in deze zandgrond. Deze plant heeft veel meer veen nodig. Ik had beter moeten nagaan of de grond wel geschikt was.”

*Wat is uw favoriete plek in de tuin?*

De bank achterin. Als ik daar zit, kan ik de hele tuin overzien. Als alles in bloei staat, is het een prachtig gezicht.”

*Uw beste tuintip?*

„Werk niet tegen de natuur in, maar met de natuur mee. Merk je dat een bepaalde plantensoort niet gedijt, bedenk dan iets anders.”



*Een roos moet geuren..*

Noten van Bert de Wit:

\* Ik kies rozen die resistent zijn tegen een schimmel, die zwarte vlekken (sterreroet) op het blad veroorzaakt.

\*\* Om infectie van rozen met honingzwam tegen te gaan, gebruik ik containers, zodat de schimmel de wortels van de roos niet kan binnendringen. Hier blijven ze in staan.

## Verklaring van het UK 2022

Verklaring van het 107e Universele Esperanto-Congres in Montreal, Canada

De 859 deelnemers - uit 57 landen - van het 107e Universele Congres van Esperanto, verzameld in Montreal, Canada, van 6 tot 13 augustus 2022, spraken over het kaderthema "Taal, leven, aarde: een decennium van inheemse talen". Door middel van territoriale erkenning tijdens de openingsceremonie van het congres, spraken we onze diepe dankbaarheid uit aan de verschillende inheemse naties, voornamelijk het Ganjenka-volk (Kanien'kehá:ka, Mohawk), dat nooit zijn rechten op het gebied waar we samenkwamen opgaf.

Door middel van lezingen, films, discussiegroepen en ook een taal cursus over Anishinaabeka leerden we over de grote diversiteit aan inheemse talen en culturen in Noord-Amerika en wereldwijd. We realiseerden ons dat inheemse volkeren een belangrijke rol spelen bij het behoud van natuurlijke hulpbronnen en biologische diversiteit, en dragers zijn van fundamentele kennis voor ons duurzame bestaan op aarde. We hebben ook gehoord hoe deze volkeren, ondanks vele barrières en aanvallen op hun rechten, zich organiseren om hun traditionele bezigheden te blijven uitoefenen, hun culturele praktijken te behouden en hun rechten op hun land te laten gelden.

Ter ere van het begin van het Internationale Decennium van Inheemse Talen (2022-2032), publiceerde ons Congres in het Esperanto een nieuwe vertaling van de Verklaring van de Verenigde Naties over de Rechten van Inheemse Volkeren. Van de vele rechten die in dat document worden erkend, vestigen we in het bijzonder de aandacht op artikel 13, volgens welke "inheemse volkeren het recht hebben om hun geschiedenissen, talen, mondelinge tradities, filosofieën, schriftsystemen en literatuur, en hun eigen namen toe te wijzen en te behouden voor gemeenschappen, plaatsen en personen." Als taalrechtenbeweging spreken we onze krachtige steun uit voor die principes.

De sprekers van Esperanto hechten veel waarde aan culturele en taalkundige diversiteit en werken samen om taaldemocratie op wereldschaal te realiseren. In overeenstemming met deze doelen en de informatie en ideeën die in dit congres zijn besproken, verklaren we onze solidariteit en steun aan inheemse volkeren in hun inspanningen voor zelfbeschikking, vrede, gerechtigheid en wederzijds begrip.



## Praten als mensen met mensen

Dit jaar was het 135 jaar geleden dat een joodse oogarts in Warschau, Lejzer Ludwik Zamenhof (1859-1917), een boekje publiceerde over wat hij als de oplossing van een groot probleem zag. Als we onze kinderen de door hem ontworpen taal, het Esperanto, zouden leren als tweede taal, zou er een nieuwe generatie opstaan die op een democratischer manier met elkaar zou communiceren. Niet in een taal zoals het in het internationale verkeer gebruikelijke Frans, waarin moedertaalsprekers altijd een voordeel hadden, omdat zij de

**Mensen moesten elkaar ontmoeten op basis van hun gemeenschappelijke menselijkheid.**

taalnormen stelden én bepaalde wat correcte conversatie was. In plaats daarvan zou het internationale verkeer op basis van neutraliteit gebeuren, in een taal die iedereen moest leren en die ook gemakkelijk te leren was.

Je kunt zeggen dat het Esperanto mislukt is. Maar als je naar de wereld kijkt kun je even goed zeggen dat de pogingen om een internationale gemeenschap te bouwen zónder een gezamenlijke, maar tot niemand in het bijzonder behorende taal en cultuur, mislukt is.

Voor Zamenhof was neutraliteit het grote ideaal. Mensen moesten elkaar ontmoeten op basis van hun gemeenschappelijke menselijkheid, niet op basis van identiteitskenmerken zoals hun godsdienst, hun moedertaal of hun nationaliteit. Mensen hoefden geen van die bijzonderheden op te geven, integendeel; maar in het openbare, internationale leven zouden ze op het tweede plan moeten komen.

Voor zover het een mislukt ideaal is, komt dit doordat in het menselijk verkeer, en al helemaal in het internationale verkeer, macht zo'n belangrijke rol speelt. Wiens brood men eet, wiens woord men spreekt. Dat het Engels nu zo'n dominante rol speelt in de wereld, dat het ook na het uitreden van het Verenigd Koninkrijk nog steeds een belangrijke taal is in de Europese Unie, dat de bekendste schrijvers Britten en Amerikanen zijn, dat Engels een verplicht vak op Nederlandse scholen en de echte buurtalen Frans en Duits niet, dat alles valt alleen maar te begrijpen in termen van macht. Het is heus niet omdat het Engels zo'n eenvoudige taal is, of om welke objectieve reden dan ook zo bij uitstek geschikt voor internationale communicatie.

Tegelijkertijd versterkt die dominante rol van het Engels het relatieve belang van de landen waar die talen gesproken worden. Er is in de Nederlandse media grotere aandacht voor betrekkelijk kleine gebeurtenissen in Amerika dan voor soortgelijke gebeurtenissen in Duitsland. Waarom? Wat er gebeurt met mensen die je kunt verstaan, voelt als dichterbij.

Zamenhof verwoordde zijn ideaal zo dat Russen geen Polen zouden ontmoeten en Fransen geen Duitsers, maar mensen ménsen.

Dat ideaal wordt nu soms benaderd door het Engels, dat op het eerste gezicht een rol speelt, zeker als pakweg een Deen en een Italiaan elkaar in die taal ontmoeten. Maar dat gebeurt wel op basis van één gemeenschappelijk denkkader: het Angelsaksische. Het gevolg daarvan is dat de huidige wereld onevenredig op de Engelstalige wereld is gericht – dat pakweg de discussie over abortus in Amerika van meer belang lijkt dan die in Polen.

Tegelijkertijd zijn de problemen van de mensheid inmiddels zo groot dat het niet goed denkbaar is dat we ze oplossen zonder veel intensiever samen te werken dat we doen. Het model van onderlinge strijd levert in het ergste geval oorlog op en in het beste geval zoveel competitie en strijd dat

**Wat er gebeurt met mensen die je kunt verstaan, voelt als dichterbij.**

de noodzakelijke maatregelen nooit genomen kunnen worden: je vertrouwt elkaar niet. Als we willen dat we samen de grote moeilijkheden oplossen, moeten we wel als mensen met mensen praten.

Het Esperanto is niet per se de ideale oplossing. Een ideale taal bestaat niet. Zo is ook de gemeenschap niet volmaakt.

**Als dat ideaal te groot en te onbereikbaar is, ziet het er slecht uit voor de wereld.**

Wel bieden de taal en vooral de gemeenschap die zich eromheen gevormd heeft inmiddels een voorbeeld van hoe het kan. Hoewel de taal altijd eerder is tegengewerkt door de officiële internationale organisaties, hoewel er zich nooit een groot bedrijf achter heeft geschaard, heeft er wel altijd een kleine maar echt internationale gemeenschap bestaan van mensen die alles met de taal doen – er is in vergaderd en gedicht, mensen hebben er een gezinsleven in geleid en er geleerde traktaten in geschreven.



Dankzij het internet is het de afgelopen decennia allemaal makkelijker dan het ooit was: je kunt de taal leren via Duolingo en vervolgens via YouTube en weblogs en sociale media een deel van je leven leiden temidden van mensen van elders. Die gemeenschap vormt een model van hoe de wereld ook kan zijn, niet omdat mensen die Esperanto leren ineens engelen zijn.

Het wordt misschien in deze tijd, op de rand van wereldoorlogen en grootschalige catastrofes én in het licht van de nationalistische reflex die daar voor sommige mensen het antwoord op is – en dan heb ik het niet alleen over wie nu tot ‘extreem-rechts’ wordt gerekend maar ook over iedereen

die denkt dat het goed is om de Oekraïners zich dood te laten vechten in onze naam in plaats van om de onderhandelingstafel te gaan zitten. Het is wel degelijk niet alleen van belang dat we met elkaar praten, dat de mensheid om de tafel gaat op grond van gelijkwaardigheid, in een vorm van communicatie die democratisch is en niemand bevoordeelt.

Als dat ideaal te groot en te onbereikbaar is, ziet het er slecht uit voor de wereld.

*Marc van Oostendorp*

## Asocio Nova Familio

Saluton gesamideanoj,

Post atendado nun malfrue - antaŭ tri semajnoj la nova studjaro komenciĝis - finfine ANF disdonis al kelkaj infanoj la lernomaterialojn, dank’ al viaj helpoj. Bedaŭrinde ni ne povis disdoni al ĉiuj prizorgataj infanoj niaj.

Pro tio esperante ni kiel ĉiam entendas la manojn por servi la aliajn infanojn nericevintajn. Ni ankaŭ ekpagos la lernejojajn kotizojn.

*Kore Betti kaj Augustin*

Por informo kaj subteni, iru al:  
<https://mallonge.net/ANFGoma>





## Rezultdevigoj kaj konkurado inter universitatoj akcelis la angligon de la instruado

Artikolo el *Science Guide*, la 28a de septembro 2022

Esploristoj de la Universitato de Maastricht intervjuis diversajn eks-rektorojn, -ministrojn kaj oficistojn kiuj influis la nederlandan politikon pri universitatoj. La esplordemando estis: kiuj faktoroj influis la angligon de la universitata instruado en Nederlando?

Unue, oni menciis la stirmeĥanisman de la nederlanda registaro post 1985. Politika dokumento el tiu tempo baziĝas sur la ideo ke la registaro stiru la universitatojn ne rekte, sed je iu distanco, tiel ke ili havu la eblecon mem decidi pri sia interna politiko rilate al studoj kaj studentoj. La entreprenema universitato estis la celo: tiel laŭ la novliberala ideologio, la universitata instruado fariĝus pli efika kaj pli adaptita al novaj cirkonstancoj. Tio stimulas la kvaliton de la instruado kaj scienca esplorado, estis la ideo. Sed tiu libereco por la universitato estis akompanata de rezultdevigoj: la registaro fiksas antaŭe la rezultatojn kiujn ili atingu, ekz. la nombron da studentoj.

Due, la financado de la universitatoj ek de tiu tempo dependis de la nombro da studentoj kaj la nombro da finstudintoj. Do, se universitato ekhavis pli da studentoj kaj pli da finstudintoj ene de iu periodo, ĝi ekhavas pli da financoj de la registaro.

Pere de « Hoger Onderwijs Plan » (Plano por la supera instruado) ĝi fiksas nombrojn da studentoj. Ekz. por la universitato de Maastricht oni fiksas nombron de 6000 studentoj. Oni pensis ke tiu universitato ne sukcesos en tio. Sed: la universitata estraro komencis varbi eksterlandajn studentojn, oferis kursojn en la angla kaj tiel ĝi tamen sukcesis atingi 6000 studentojn.



Foto: Canva

La ideo de la universitato de Maastricht inspiris aliajn universitatojn fari same, kaj konsekvence la angligo de la instruado progresis rapide.

Oni povas aldoni al ĉi tiu artikolo ke la rezulto de tiu novliberalisma politiko pensigas: nederlandanoj kiuj ne plu povas studi iun fakon en sia propra lingvo. Alia rezulto estas pli granda distanco inter la scienco kaj la sociaj problemoj en la lando. Kelkaj universitatoj, ekz. la universitato de Amsterdamo, ekreagis kaj metis limon al la nombro da eksterlandaj studentoj. Cetere estas verŝajne alia pli grava kialo, nome ke mankas loĝeblecoj por (eksterlandaj) studentoj en la urbo. Oni parolas ankaŭ pri « studentoj » eksterlandaj kiuj petas stipendion por tiamaniere eniri la landon sen iam ekstudi.. do: la entreprenema universitato stimulas entreprenemon, certe! Sed ĉu dezirinde?

Bert de Wit

## Ik ben ontredderd

Boven een naar Het Parool gestuurd artikel van Kees Ruig, lid Esperanto Nederland en oud-koopvaardijofficier, staat: "Nederlandse vlag op z'n kop is een flater" (Het Parool, vrijdag 2 september). Hij beschrijft in dit artikel een paar gebruiken en etiketten rondom het vlaggen, bijvoorbeeld met betrekking tot het halfstok vlaggen. De etikettes tellen alleen voor nationale vlaggen, dus niet voor de Amsterdamse vlag of die van Ajax.

Als stuurman weet Kees Ruig ook een en ander over vlaggen in de scheepvaart. Hij denkt dat heel misschien de vlag vroeger omgekeerd werd gehesen wanneer iemand in nood was, maar hij betwijfelt dat. Volgens hem is dan ook het op

de kop uithangen not done: "Ik wil niet zeggen dat het een belediging is, maar het is gewoon een flater voor degene die hem zo heeft gehesen." Kees Ruig pleit er daarom ook voor om in plaats van de nederlandse vlag de seinvlag Foxtrot te gebruiken. Dit zou er dan zo iets als hiernaast uitzien. De vlag betekent: "Ik ben ontredderd, stel u met mij in verbinding".





## Woorden doen er toe

Eva Meijer schrijft in een column in het NRC (1 augustus 2022) dat in de afgelopen twaalf jaar de politieke taal volgens haar in Nederland steeds instrumenteler is geworden: steeds sterker een middel tot een doel, in plaats van een opening naar een gesprek. Dit uit zich volgens haar bij politieke communicatie in korte herhaalbare citaten, waarbij woorden als wapens worden ingezet. Ze haalt daarbij woorden van premier Rutte aan. Hij zou volgens haar het land als bedrijf behandelen. Termen die daarbij horen zijn optimistisch en appelleren aan een Nederlandse volksaard. Hij had het bijvoorbeeld over: "Intelligente lockdown" (Wie wil er nou niet intelligent zijn?) en zegt "Laten we met zijn allen weer een beetje normaal doen.", waarbij hij de normen van een selecte groep algemeen maakt. En tijdens de coronatijd zei hij ook: "We doen het samen.". Dit laatste verbloemt volgens haar dat de coronaepedemie juist de sociale en economische ongelijkheden blootlegt.

Volgens Eva Meijer zijn deze woorden niet alleen lelijk, maar gaan ze ook de democratie tegen. Ze schrijft: "Democratie is altijd rommelig en onaf, samenleven met anderen kost moeite. Gesprekken zijn bijvoorbeeld niet efficiënt: ze kosten tijd en misschien hebben ze geen concrete uitkomst, of leggen ze onoplosbare tegenstrijdigheden bloot. Maar om recht te doen aan verschil en betere manieren te vinden om samen te leven zijn ze noodzakelijk." Eva legt uit dat de taal die we gebruiken ons kan helpen. Ze kunnen ons helpen de leefwereld aan anderen te laten zien en de meenschappelijke wereld anders te laten zien. Eva Meijer: "Dat zit niet alleen in



Foto: Johan Remkes tijdens de persconferentie van 5 oktober, bij de uitreiking van de stikstofbrief, waarin hij o.m. aangeeft dat de kloof tussen platteland en Den Haag groter is geworden.

de verhalen die we vertellen, ook in de manier waarop we dat doen."

Ik las deze column en realiseerde me dat hetgeen Eva Meijer in haar column schrijft ook voor ons Esperantisten een les kan zijn. De taal Esperanto alleen is niet genoeg. Met management- of stopwoorden kunnen we misschien wel sneller ons gelijk halen; op de langere termijn werkt het gebruik hiervan averechts. We zullen ook moeten nadenken over welke woorden we gebruiken.

Foppe-Klaas Hovinga



LUMINESK' estas internacia silvestra renkontiĝo de Germana Esperanto-Asocio kaj postrestaĵo de la antaŭe private organizita "Internacia Festivalo". Ĝi okazos la sepan fojon kaj enhavas varian kaj altkvalitan programon: lingvo-kurso, prelegoj kaj diskutrondoj, ekskursoj kaj kultura vespera programo. La partoprenantoj venas el 7-8 landoj.

Kontakto: Andreas Diemel; retpoŝto: [demandoj@luminesk.de](mailto:demandoj@luminesk.de)

## Arkones

Poznano (Pollando), vendredo la 23-an ĝis dimanĉo la 25-an de septembro 2022.

El Nederlando oni bezonas veturadon de 9 ĝis 13 horoj, sed por mi tiu ĉi evento estis proksima, ĉar Poznano estas mia dua hejmo. Tamen estis la unua fojo ke mi ĉeestis la kulturalan kaj artan esperantistan aranĝon Arkones.

Ĉirkaŭ 100 personoj ĉeestis en la "Dom Kultury Kolejarza" (Esp. "Kulturdomo de la Fervojoj") en Poznano je la 36-a Arkones. La aranĝo konsistis el danco, kantado kaj prelegoj kaj ĉefe multe da prelegoj.

La prelegoj okazintaj sabate kaj dimanĉe traktis diversajn kulturajn temojn.

La Esperanto-kulturo havas ĉiujn aspektojn, kiujn ankaŭ aliaj kulturoj havas: pensmanieroj, valoroj kaj normoj, komunaj kutimoj, gazetoj, radiostacioj, lokoj, institucioj, eventoj, herooj, religioj (ekz. Bahaismo), ĉiaj artoj, formoj, kiel muziko, danco, teatro kaj kompreneble multe da literaturo. Malpli estas la konstruaĵoj kaj la edukado de infanoj. Kaj pro manko de mono filmoj ĝenerale ne estas de alta kvalito. Pri tio Ilona Koutny verkis libron kaj ŝi nun ankaŭ prelegis.

Tim Owen parolis pri sia serĉo pri la origino de la verda stelo. Francois Lo Jacomo nomis la esperantajn teatraĵojn, kiuj estis luditaj.

Gravas por la Esperanta kulturo Esperanto-radio. Ĝi nun estas 100-jara kaj Barbara Pietrzak kondukis nin tra ĝia historio. La nombro da Esperantaj radiostacioj rapide kreskis baldaŭ post la kreado de radio kaj nur dum la dua mondmilito mankis elsendoj. Sabate Francois Lo Jacomo nome de UEA enmanigis al ŝi diplomon pri Elstara Agado. (Vidu la dekstran paĝon.)

Vi ne pensas pri tio, sed vitro estas ĉie. La ŝatokupo de Katalin Kováts estas fari vitrajn juvelaĵojn. Ŝi faris fascinan



La dancgrupo Ĉeremšina



Barbara Pietrzak ricevas diplomon de Francois Lo Jacomo

prelegon pri farado de vitro. En Italio ŝi vizitis vitrofabrikojn.

Irek Bobrzak havas florigardenon. Li malkovris, ke multaj plantoj havas plurajn nomojn, kiuj baziĝas sur la latina nomo aŭ sur nomoj de aliaj lingvoj. Li kolektadas la nomojn en listo kaj petis botanikistojn juĝi kiuj nomoj konvenas plej bone. La listo devus esti finita en 8 jaroj.

Kompreneble ankaŭ estis tempo por malstreĉiĝo. Vendrede vespere la Esperanto-studentoj prezentis sin al la ĉeestantoj. Ili venis el la tuta mondo. Ankaŭ estis muziko kaj dancado. Benoit Stasiaczyk aŭdigis sian muzikon el Ĉinio. La dancgrupo Ĉeremšina, rifuĝintaj knabinoj kaj infanoj el Ukrainio, prezentis dancon, kiu memorigis min pri Kalush Orchestra (gajninto de la Eŭropa Kantkonkurso): kaj sentema kaj forta. La kantistoj ĉe tiu evento estis Oksana Kovlivska, ankaŭ rifuĝinto de Ukrainio, Suzana Kornicka kaj Anjo Amika, kiu kantis kristanajn kantojn. Ni



Prelego de Katalin Kováts pri vitro.



Tim Owen prelegas pri simboloj.

kutimis kanti ilin hejme ĉe la tablo kiel vesperajn preĝojn. Mi spertis tion kiel tre speciala kiam miaj propraj kulturoj kunfandiĝis.

Inter la sabataj prelegoj estis malstreĉa seanco pri cirklodancoj, dancado en rondo. Ĉie en la mondo ĝi estas dancata en malsamaj manieroj. Post kiam Danuta Leyk diris al ni el kiuj dancmovoj ĝi konsistas, ŝi lasis nin sperti la dancadon.

Estis malmulte da eblecoj interparoli sed estis speciale ĉeesti ĉi tiun eventon kaj aŭdi tiom multe pri Esperanto-kulturo. Mi certe rekomendas ĉi tiun eventon. Krome mi planus kelkajn kromajn tagojn por viziti ankaŭ la urbon aŭ aliajn urbojn en Pollando.

Vi povas vidi registraĵojn de prelegoj kaj kantado sur la paĝo de Jan Skonieczka: <https://mallonge.net/226jansko>

Foppe-Klaas Hovinga





Kantistinoj Oksana Kovlivska kaj Suzana Kornicka.



Barbara Pieczak rakontas pri la historio de Pola Retradio.



Francois Lo Jacomo kaj la gastigantoj de tiu ĉi evento: Tobiasz Kaźmierski kaj Ela Malik.

## Humuraĵoj

Kara Kristnaska Paĉjo, miaj deziroj por la venonta jaro estas: DIKA banka konto kaj MALDIKA figuro. Bonvolu ne intermiksi miajn du dezirojn kiel vi faris pasintjare...

Katolika Sento, n.4 /2021, De Giovanni Gazzola



La diplomon Pola Retradio ricevis de UEA.

# Internacia Fervojojista Esperanto-Kongreso en Antverpeno



retadreso: [info@ifef2023.net](mailto:info@ifef2023.net)  
retejo: <http://ifef2023.net>

## 74a Internacia Fervojojista Esperanto-Kongreso

*Temo: transporto kaj daŭripova evoluigo*

Antverpeno 6-12 majo 2023

Postkongreso en Valonio 12-14 majo 2023

**ANTVERPENO**  
**IFEF 2023**



La temo de la kongreso estas "**Transporto kaj daŭripova evoluigo**".

Ĝin traktos prelegoj kaj diskutgrupoj. Ne povas manki la fakprelegoj de IFEF pri fervojaj temoj.

### Provizoraj programeroj de la kongreso:

Faka ekskurso al Trainworld en Schaarbeek (Bruselo), kultura vespero, vizito de la urbo kaj de la centra stacidomo, prelego pri Antverpeno kaj Flandrio kun popola muziko, atelieroj, Esperanto-kursoj, movadaj aferoj kaj Solena Fermo, tuttaga ekskurso per buso al la haveno de Antverpeno kaj al la muzeo de la vaporfervojo de Maldegem, veturo per vaportrajno.

### Programeroj de la postkongreso:

Vizito de "le Bois du Cazier" en Marcinelle, vizito al la muzeo de la milito en Bastogne, vojaĝo per la trajneto de la tri valoj en Mariembourg kaj vizito de la vaporfervojo en Treignes.

### Organizantoj

De la IFEF-kongreso en Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo (FEL) kune kun la aktivuloj de BAFE (Belga Amikaro de Fervojojista Esperantistoj), sekcio de IFEF (Internacia Fervojojista Esperanto-Federacio).

De la postkongreso en Valonio: Michèle De Meyere.






# Revuo-interŝanĝo Benata Hengstmengel-Koopmans

**Revuo-interŝanĝo de Benata Hengstmengel-Koopmans estas projekto por legi pliajn revuojn.  
Vi povas kontakti min pere de la retadreso [benata@zonnet.nl](mailto:benata@zonnet.nl).**

**La Revuo Orienta:** 103a jaro, numeroj 1198 kaj 1199,  
junio kaj julio 2022

Ravis min la artikolo “La daŭre benplena lingvo”, de Sinjoro Syauqi Styta Lacksana el Indonezio (publikigita en la serio ‘Esperanto kaj Mi’ en 2 partoj). Li skribas ke li eklernis Esperanton antaŭ 10 jaroj pro enuiĝo dum fastado dum Ramadan kaj ricevis multajn geamikojn en eksterlando. Ne nur pro korespondado, sed ankaŭ pro vizitoj al Esperantistoj pere de Pasporta Servo kaj partopreno en diversaj kongresoj.

La frontpaĝa desegnaĵo estas de Hori Jasuo, kiu skribas pri invito de amikino, kiu nun loĝas en Havajo.



**Revuo Kontakto:** 57a jaro, numero 307, 2022-1,  
<http://kontakto.tejo.org>

Artikolo pri “La malbeno de la faraono” de Franz-Joseph Geidel el Aŭstrio, kiu aperas sur artaĵo de nekonata aŭtoro adaptita de Romulo Felicio.

Artikolo pri “Uĵupis, lando de l’ fantazio” de Lenka Doskarova el Ĉeĥio. Temas pri parto de Vilno, la ĉefurbo de Litovio, kiu estis juda kvartalo kaj kie nun precipe loĝas artistoj, kreivaj junaj homoj. La aŭtoro komparas la lokon kun la ŝtato Moresnet.

Artikolo pri “Nia unua muzikalo en Esperanto” de Rogier (Roĉjo) Huurman el Nederlando, projekto por prezento dum la IJK 2022 en Westelbeers. Ebligis tion ekstera subvencio de 25 mil eŭroj.

Artikolo pri “Volontuloj, odo al la silenta sufero” de Carlos Pesquera Alonso el Hispanio. Pri la vivo de volontuloj en la Centra Oficejo kaj en la Volontula Domo en Roterdamo dum la Korona krizo.

**Monato:** 43a jarkolekto, aŭgusto-septembro kaj oktobro 2022, [www.monato.be](http://www.monato.be)

El la aŭgusto/septembro-numero: Sinjoro ‘Last’, korespondanto en Litovio, demandas ‘Ĉu milito disigas popolojn?’. La artikolo priskribas la diferencojn inter la rusaj enloĝantoj de la Baltaj ŝtatoj.

En ‘Taglibro de l’ milito’ la -komprenoble anonima- aŭtoro pritraktas la unuajn 100 tagojn de la milito en leteroj el Moskvo. Kees Neeft konstatas ke entreprenoj estonte agos konforme al la impostreguloj.

‘Ĉu Belgio plu ekzistos?’ post la sekvontaj elektoj estas necerte por la belga Ivo Durwael en sia eseo.

**El la oktobro-numero:** En la rubriko Moderna vivo Xu

Jinming el Ĉinio skribas pri la “Rajto reedziniĝi en Ĉinio”.

En la rubriko Scienco Bert de Wit demandas “Ĉu post kovimo venos nova pandemio?” Temas pri Simia pokso (ne variolo!), malsano kiu originas en la okcidenta kaj meza partoj de Afriko. En la rubriko Ornitologio Julius Hauser el Slovakio mencias ke ornitologoj trovis novan birdospecion.

En la rubriko Libro Gerrit Berveling recensas la novan eldonon de la famkonata Parnasa gvidlibro de Kalocsay, Waringhien, Bernard kaj la nova kunlaboranto Ruggiero. En la rubriko Pentrarto Aleksej Salomatov laŭdas la ekspozicion pri Oleg Celkov (1934-2021), “Fremdulo”, kiu okazis en la Moskva Muzeo de Moderna Arto (!) de la 2a de marto ĝis la 10a de julio 2022.

**Puraj Pulmoj, Organo de Tutmonda Asocio de Esperantistaj Nefumantoj (TADEN):** 22-1 kaj 22-2

La unua numero de estraranoj Jan Bemelmans kaj Rob Moerbeek precize aperis je la Monda Nefumtago, la 31a de majo 2022, kaj temas pri agadoj kontraŭ tabako en diversaj landoj kaj pri tabakkultivistoj. Ĝi finiĝas per la slogano: “Pura aero eĉ pli esencas ol pura akvo – tutmonde”.

La dua numero, kun nur mallonga teksto pro la samtempe okazanta UK en Kanado, mencias kelkajn aktualaĵojn pri fumado/nefumado ĉe malsanulejoj, lernejoj, en aŭtoj kun infano(j) kaj/aŭ gravedulino.

**NGGE sciigas (Nederlanda Grupo de Geinstruistaj Esperantistoj):** junio 2022

Protokolas Rob Moerbeek kaj Simon Smits: Pri Packunveno en Utreĥto en majo, kie NGGE okupis sin pri “Pacdukado, la rolo de lernejoj en la pacmovado”.

Pri kelkaj novaj katolikaj sanktuloj, i.a. Titus Brandsma, kiu



estis Esperantisto. Li naskiĝis 23-2-1881 en Ugoklooster apud Bolsward kaj mortis 26-7-1942 en la koncentrejo en Dachau. Pri Informado pri Esperanto en Nederlando. La prezidanto eksciis ke Bert de Wit havas 1 perkorespondan kursanon kaj Federico Gobbo instruas al 18 studentoj, sed li bedaŭras ke neniu plenigis lian enketilon pri instruado dum la jarkunveno de Esperanto Nederland.

**Heroldo/Esperanta Civito:**

<https://www.esperantio.net/index.php?id=39>

En la retpaĝo mi trovis aktualan artikolon de Giorgio Silfer (HeKo 794 8E, 9a septembro 2022): “Rememore pri ŝia Reĝina Moŝto Elizabeta la Dua”. Li rememoras personan renkonton en majo 1999 kun la ĵus mortinta Brita reĝino.

El HeKo 790 6A, 6a julio 2022: “Roterdamo liveris al Vieno bibliotekon kaj arkivon”.

**Revuo Esperanto, 115a jaro, n-ro 1364, januaro 2022**

Aperis interesa artikolo de Bernhard Tuidier pri “Arkivoj en la Esperantomuzeo en Vieno”.

**Revuo Esperanto, 115a jaro, n-ro 1370, julio-aŭgusto 2022**


Trafis min la forpaso de Helmut Klünder (4-7-1948 ĝis 16-6-2022), kiu estis ‘gasto’ en nia familio dum la UK en Harlemono 1954. Mia patro anoncis la restadon kiel infankongreseton, sed Helmut malŝatis la restadon kun nur mi kiel 3-jara knabino. Tamen li skribis en mia poezia albumo dum mia unua Infankongreseto en Mainzo 1958 sian nomon kaj adreson.



Foto de la Infana Kongreseto en Mainzo 1958, farita antaŭ la UK-kongresejo.

Mi ne aperas en la foto de Mainzo, kaj mi ne estas certa kiel aspektis Helmut. Estas grupo kiun gvidis mia patro, Wim Koopmans. Li staras maldekstre fone. Mia kongrespatrino estis la patrino de Ulrich kaj Guido Brandenburg, Margret Brandenburg.

La tiama adreso de Helmut Klünder, kiu forpasis lastsomere.



## Zamenhof vivo (korektata)

Jean-Pierre Cavelan komencis bildstrion en la franca kaj en Esperanto pri la vivo de Ludoviko-Lazaro Zamenhof.

Ĉiu, kiu parolas Esperanton, estas invitita helpi la laboron per kritikoj, korektoj, sugestoj, (mal)kuraĝigoj ktp. <https://mallonge.net/qk>

Henri Masson



## Nova kreanto por la vortserĉenigmo

Frank van Hertrooij sciigis nin, ke ne plu eblas kombini fari vortserĉenigmojn kun sia studo.

Frank: "Mi terure bedaŭras, sed mi eltrovis ke la farado de la vortserĉenigmoj ne kombineblas kun mia magistra tezo kaj la apudaj universitataj kursoj. Ekster la multaj horoj en la laboratorio, oficejo, leciona salono kaj poruniversitataj vojaĝoj, mi devas tre zorge pripensi kiel mi uzas mian personan tempon. Mi decidis ke mi signife malpliigos la tempon kiun mi dediĉas al mia laboro por esperantujo kaj mia volontula laboro ĉe la astronomia observatorio. Mi komprenas ke multaj homoj ŝatis la enigmojn, sed bedaŭrinde tago ne havas pli ol 24 horojn."

Frank komencis fari vortserĉenigmojn kiam li kaj Marko Konijnenberg estis redaktoroj por Fenikso. Ni estas tre dankemaj, ke li daŭrigis ĉi tiun taskon post kiam li finis sian laboron kiel redaktoro. Mi nombris, ke Frank faris entute 18 enigmojn. Frank, en ĉi tiu loko ni dankas vin pro via laboro kaj deziras al vi ĉiun sukceson kun viaj studado kaj magistriĝo. Mi esperas, ke vi daŭre ĝuos Esperanton kaj la eventojn.

Ni ĝojas, ke Det Koning pretas transpreni ĉi tiun korean taskon de Frank. Sur la dekstra paĝo vi trovas sian unuan vortserĉenigmon. Apude Det Koning prezentas sin.



### *Det Koning*

Mi naskiĝis en la provinco 'Groningen' kaj loĝis en 'Beverwijk', 'Groningen', 'Zuidlaren', 'Hoevelaken' kaj nun en 'Terneuzen'.

Esperanton ni (mia edzo Jan kaj mi) lernis en 'Gent', fine de la okdekaj jaroj. Post la kurso mi membriĝis al FEL kaj iom poste (kiam?) al 'Esperanto-Nederland'. Ankaŭ dum kelkaj jaroj mi estas membro de UEA.

Mi ne estas vera 'spertulo', sed legas kelkajn revuojn kaj korespondas kun esperantistoj en Pollando, Hungario kaj Ukrainio.

Intertempe mi ankaŭ kolektis multajn lego- kaj kursolibrojn.

Praktiki la lingvon estas alia afero...

Antaŭ kelkaj jaroj ni bonvenigis Pasporta-Servo-anojn, sed mi ne estas vojaĝema. Do ni ne iris al kongresoj aŭ eksterlandaj aranĝoj.

Antaŭ 2020 ni regule vizitis la belgajn klubvesperojn en Gento kaj Antverpeno aŭ partoprenis en (natur-)promenoj, aranĝita de la kluboj en Kortrijk kaj Kalmthout.

Iam ekzistis malgranda Esperanto-grupo en Terneuzen kaj ni kune ekzercis, legis, ripetis kaj ... kaftrinkis, sed serioze!  
*La 19-an de oktobro 2022.*



# Vortserĉenigmo

La temo de la enigmo de ĉi tiu eldono estas **Mondloĝanto**.

Solvo de la antaŭa vortserĉenigmo estas:

**"Sen via helpo mi ne solvos tiun problemon"**

La ĝusta solvo estis sendita de Frank Hoens. En la solvo de Mariska de Jonge mankis unu litero, igante la mi-personon multe pli (tro) negativa pri siaj propraj kapabloj.

Pro sia studo Frank van Hertrooij ne plu havas tempon krei vortserĉenigmon. Det Koning el Terneuzen transprenas lian laboron.

Sendu vian solvon al ni. Ni metos la nomojn de tiuj, kiuj solvis la vortserĉenigmon en la venontan numeron.

## Vortoj:

Afriko	gango	niĝero
Alaska golfo	gobio	nigra maro
Alpoj	golfo	nilo
Ameriko	induso	oceano
Aŭstralio	kongo	rivero
Azio	maroko	roko
Ĉinio	mekongo	saharo
Danubo	meksikio	sudĉinio
Dezerto	misisipo	uralo
Eŭropo	montaro	

Frazo:

Kreita de Det Koning

m	d	o	ĉ	n	u	n	m	a	t	e	r	u	o
g	a	e	f	i	n	m	z	e	p	o	a	r	r
s	o	r	z	l	n	i	e	l	k	m	a	a	e
h	a	b	o	e	o	i	g	o	e	o	o	l	v
m	o	h	i	k	r	g	o	r	f	a	n	o	i
o	i	r	a	o	o	t	i	l	a	o	o	g	r
i	k	a	f	r	i	k	o	s	p	m	l	e	o
n	i	m	r	t	o	g	n	a	g	a	a	i	s
i	s	o	i	l	a	r	t	s	ŭ	a	m	r	n
ĉ	k	n	a	k	l	m	i	s	i	s	i	p	o
d	e	t	s	o	k	v	i	e	a	l	p	o	j
u	m	a	i	n	d	u	s	o	r	e	ĝ	i	n
s	l	r	t	g	e	c	o	d	a	n	u	b	o
a	n	o	p	o	r	ŭ	e	o	n	a	e	c	o



## Letero al la rusaj soldatoj

Anneke Schouten-Buys sendis al ni la suban tekston de Bardhyl Adem Selimi el Kosovo, kun la titolo "Ukrainio hodiaŭ kiel Pollando en 1863". Ni ne povas scii kiel iu el la pasinteco, ĉi-kaze Victor Hugo, juĝus la nunan situacion. Ni povas nur supozi tion, trovi argumentojn.

### Daŭra aktualeco!

Leganto de la regiona gazeto DNA (Les Dernières Nouvelles Alsace) interese kaj trafe informis la legantojn per la suba letero de la famkonata franca verkisto Victor HUGO

«Alvoko al la rusa armeo en 1863\*». Tiu leganto aldonis: «Se oni anstataŭigas en tiu ĉi teksto la grasliterajn terminojn «Pollando, pola, Varsovio, Peterburgo, caro kaj XIX-a jarcento» per «Ukrainio, ukraina, Kievo, Moskvo, Putin kaj XXI-a jarcento», eblas peti de Victor HUGO, ke li ree sendu sian leteron al la rusa armeo! Konstatu mem!

Rusaj soldatoj, reĝu homoj. Ĉi gloro estas aktuale proponata al vi, ekkaptu ĝin. Dum tio ankoraŭ eblas, aŭskultu:

Se vi daŭrigas ĉi sovaĝan militon; se vi, oficiroj, kiuj estas kun noblaj koroj, sed kiun kaprico povas malgradigi kaj ĵeti en Siberion; se vi soldatoj, hieraŭaj servutuloj, hodiaŭaj sklavoj, perforte forŝiritaj de viaj patrinoj, de viaj fianĉinoj, de viaj familioj, regatoj subknutaj, malbone traktataj, malbone nutrataj, kondamnitaj dum longa tempo kaj por nedefinita daŭro al milita servado, pli severa en Rusio ol punlaboro alilande; se vi, kiuj estas viktimoj, vi vin engaĝas kontraŭ la viktimoj; se je la sankta momento, kiam la respektinda Pollando ekstaras, je la lastebla momento, kiam vi povas elekti inter Peterburgo, kie regas la tirano kaj Varsovio,

kie regas la libereco; se en tiu decidiga konflikto, vi ignoras vian devon, vian unikan devon, la fratecon; se vi komune agas kontraŭ la poloj kune kun la caro, t.e. ilia ekzekutisto kaj la via; se, subprematoj, vi de la subpremato lernis nur la subtenon de la subpremato; se vian malfeliĉon vi transformas al honto; se vi, kiuj tenas ĉemane la spadon, vi disponigas al la despotismo, peza kaj malforta monstro, kiu vin ĉiujn dispecigas, vi rusojn same kiel la polojn, vian forton blindan kaj dupan; se anstataŭ vin turni kaj alfronti la buĉiston de la nacioj, vi malbrave subpremeblas, per la supereco kaj la multnombreco de la armiloj, tiujn heroajn, malesperigitajn popolanojn postulantajn unuarangan rajton, la rajton je patrolando; se meze de la deknaŭa jarcento, vi finmurdas Pollandon, se vi tion faras, sciu tion, viroj de la rusa armeo, (...) vi naskos la abomenon de la civilizita mondo! La krimoj de la perforto estas kaj restas krimoj; la publika hororo estas puno.

Rusaj soldatoj, serĉu inspiron ĉe la poloj, ne batalu kontraŭ ili. Tio, kion vi trovas antaŭ vi en Pollando, tio ne estas la malamiko, tio estas ekzemplo.


Victor HUGO, Hauteville-House, la 11-an de februaro 1863

\* La pola insurekcio de 1863 kontraŭ la rusa imperio estis ribelo por la sendependeco de Pollando en la tiama pola teritorio, kiun tiam okupis Rusio.

## Ĉu pitulo grandus?

Frans Cobben, septembro 2022

Ĉu pitulo grandus,  
Ĉu turpulo bele  
Kaj honeste pravus,  
Ĉu la malbelulo  
Ĉiele lojalus,  
Ĉu la malgrasulo  
Dike mal-avarus?



Vertaling van de redactie:

Zou een kleintje groot zijn,  
Zou een boef mooi en eerlijk gelijk hebben,  
Zou de lelijkheid in de hemel trouw zijn,  
Zou de magere man genereus zijn?

## Ricevita retmesaĝo

Kara Esperanto Nederlando,

Korekte ricevis mi la Fenikson de sep/okt 2022, mi ŝatas la eseon de sinjoro Federico Gobbo pri la fundamentaj leĝoj de esperantista stulteco, komparu la poemon "estas mi esperantisto":

*pionirojn mi kritikas,  
la gvidantojn dorne pikas,  
kaj konspiras kun persisto,  
estas mi Esperantisto!*

*Ne krokodilu kaj ne kabeu,  
arĝentajn salutojn al vi de s-ro Frans Cobben*



## Corrie Kwantes – Kooy

1942 – 2022

La 5an de septembro forpasis en Harlema Corrie Kwantes – Kooy, 80-jara. Dum pli ol 50 jaroj ŝi estis aktiva membro de FLE, poste Esperanto Nederland. Krome ŝi ankaŭ estis dum longa tempo perantino de SAT en Nederlando.

Jam kiel infano ŝi lernis Esperanton, kaj unu el la plej unuaj frazoj, kiujn ŝi (kaj mi) lernis estis: “Ĉu vi ŝatas tason da teo?”. En 1955 ŝi partoprenis la infankongreson de SAT en Linz, Aŭstrio kaj tie profundiĝis ŝia entuziasmo por Esperanto. En la 70-aj jaroj ŝi aktivis en grupo de SAT-Junulfako kiu eldonis « La Juna Penso » en stencilita formo. Membro de Roterdama sekcio de FLE, ŝi partoprenis longtempe la kunvenojn en Brabantsestraat.

Multajn SAT- kongresojn ŝi partoprenis, unue sola, poste kune kun Rob Kwantes kun kiu ŝi edziniĝis en 1977 kaj post la naskiĝo de Nico, triope. De Toronto ĝis Vilnius kaj Narbonne, ĉie ili ĝuis la esperantan etoson.

Ne nur internacie, sed ankaŭ nacie ŝi aktivis por Esperanto. Dum ĉiuj FLE-kongresoj kaj aliaj Esperanto-kunvenoj Corrie kaj Rob fidele prizorgis la standon de la Libroservo de FLE, kie krom libroj multaj aliaj esperantaĵoj estis haveblaj. Kaj kiam ĉiuj partoprenintoj

jam estis for, ili ankoraŭ laboris por transporti ĉion en la aŭtomobilon.

Interesitoj ricevis superflujajn periodaĵojn de ŝi.

Corrie prizorgis ankaŭ dum multaj jaroj la bultenon « Matenruĝo » de la harlema sekcio.

Ŝi ne nur en Esperanto-rondoj aktivis, sed ankaŭ partoprenis la naturgrupon de NIVON kaj la grupon de poŝtmarkkolektantoj kaj ŝatis ludi akordionon. Ŝia sanstato iom post iom malboniĝis kaj nur kelkfoje ŝi partoprenis la kunvenojn de la harlema sekcio de Esperanto Nederland. Dank'al la amoplena helpo de Nico ŝi ankoraŭ longe povis resti en sia hejmo. Fine ĉijare ŝi devis transloĝiĝi al flegejo. Tie ŝi mortis la 5an de septembro.

La Esperanto-movado perdis fidelan membron....

*Inge de Bruin – Kooij*

\*\*\*



## Piet Damman

Amsterdamo, la 14-an majo 1932 - Eindhoven, la 2an de septembro 2022

Hodiaŭ nia klubo kvarpersone ĉeestis la kremacian ceremonion por Piet Damman, multjara membro de Esperanto-Klubo Eindhoven (EKE) kaj Neuniversala Esperanto-Asocio (NEA)/Esperanto Nederland. Pensante pri Piet mi memoras lin kiel trankvilan, plurfoje nur aŭskultantan homon kiu tamen fojfoje en niaj kunvenoj aŭdigis enbuŝan hmm hmm... tiel atentigante nin pri iu neĝusta uzo de la lingvo Esperanto...

Piet eklernis Esperanton post sia labora vivo, kaj tre bone ĝin lernis. Tia persono li estis, tion mi komprenis el la paroloj en la ceremonio.

Liaj kontribuoj al la kunvenoj de EKE estis altnivelaj. Temis pri konatigo de hajkoj, aliaj poemoj, esprimoj, kaj tekstoj pri iu ne-ĉiutaga afero aŭ mondvasse konata

problemo.... Fojfoje tiuj kontribuoj estis iom tro peza por kelkaj membroj.

Por NEA, poste Esperanto Nederland, li multjare fotis en la kunvenoj. En sia parolo nepo de Piet bone vortigis en Esperanto siajn kaj niajn sentojn, inter alie per: “Avo, ni amas vin...” Mi aldonas: “Piet, ni dankas vin”.

*Mareje van Erp, nome de EKE Eindhoven*


\*\*\*



## La romano "La filoj de l' ŝtonkora homo" de Mór Jókai

"La estiminda sinjoro ankoraŭ nun nur la duonon de la tosto diris... La nektarŝaŭmo de la ĉampana glaso fluetis sur liaj dikaj fingroj ĝis la ungoj. La komencita bombasto trokreskis super la efikkapablon de la pulmoj kaj provis ĉiujn movkapablojn de la kolmuskoloj. La nobla fervoro pelis la sangon tute en lian vizaĝon. Ĉiuj anoj de la estiminda gasto-rondo prete tenante sian manon sur la svelta anso de la glaso, avide al la gloro atentis kaŝe la pintumon de senlima direndaĵo de la tosto; la hajduk-armeo strebis plene plenigi ĝis la duono la malpleniĝintajn glasojn... La arĉo de la estro de la malantaŭen starigita egipta orkestro en aeron estis levata, ke kiam la tosto finiĝos, ĝi tuj kun freŝa entuziasmo komencu violonludi la glasotintadon mutigantan fanfaradon, dume la domkuracisto de la familio senbrue paŝante venis en la ĉambregon kaj flustris nur kelkajn vortojn en la orelon de la sinjorino prezidanta ĉe la tablokapo kaj pro tio ĉi ŝi forlasis subite sian lokon kaj apenaŭ montrante sian vizaĝon, petante permeson de la apud ŝi sidantaj, foriris el la ĉambrego."

Tiel komenciĝas la libro de la lasta tradukita libro de Ladislao Pásztor. En la lasta numero de Fenikso ni publikigis kvar librojn de li. Ĝus antaŭ ol Fenikso estis preta por la enpaĝigo, Adri Pásztor informis nin, ke ankaŭ la lasta libro, tradukita de ŝia edzo, estas preta. S-ino Adrienne Pásztor: La romano estas epizodo 19-jarcenta el la hungara historio tra vivo de unu nobela familio. Ĝi estos agrabla legaĵo. Volu ĝin ekkoni, ja ĝi donos al vi multajn konojn, kaj ĝuon.



Por pli da informo, vi povas kontakti S-inon Adrienne Pásztor: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu).

## Programmeren in je eigen taal

Met de programmeertaal Hedy kunnen kinderen nu leren programmeren in hun eigen taal.

Leren programmeren met programmeertalen voor volwassenen is vaak te moeilijk voor kinderen, omdat ze veel codes uit hun hoofd moeten leren. Universiteit Leiden heeft daarom een website waarop kinderen in kleine stapjes het programmeren kunnen leren.

Veel programmeertalen zijn geschreven in het Engels, maar dat is voor kinderen een extra drempel om het te leren, daarom heeft de maker van Hedy, dr. ir. Felienne Hermans, het nu zo gemaakt, dat iedereen het in de eigen taal kan leren. Daarmee is het ook beschikbaar in het Esperanto. Hedy maakt gebruik van de webbased vertaaltool Weblate.

Informatie over Hedy: <https://www.hedycode.com>. De programmeerpagina: <https://www.hedycode.com/hedy#default>.



## Afrika Kongreso de Esperanto

Afrika Kongreso de Esperanto okazos, sub la temo "Esperanto - ŝanco kaj ne minaco por Afriko" en Tieso, Senegalo, de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022.

Se vi havas informojn bv. skribi al: [ake-8-organizantoj@googlegroups.com](mailto:ake-8-organizantoj@googlegroups.com).



## Respondoj de la

# Lingva testeto

Jen la respondoj de la lingva testeto de paĝo 7.

Respondo de demando 1: b.

*Tegolo* estas plato el bakita argilo, ofte uzata por kovri tegmentojn (nederlande: *dakpan*). Murojn oni povas konstrui interalie el *brikoj* (*bakstenen*). En kuirejo kaj banĉambro oni trovas glazuritajn *kahelojn* (*tegels*).

Respondo de demando 2: b.


La prefikso *retro-* estas neoficiala sed sufiĉe ofta. Ĝi signifas *malantaŭen* aŭ pli ĝenerale *kontraŭe al la normala direkto*. Ekzemplo: *kion vi ŝanĝus se eblus retrovojaĝi tra la tempo?* Aŭ: *ŝi lerte retrostiris la aŭton el la garaĝo*. Notu ankaŭ la vortojn *retroefike* (*met terugwerkende kracht*) kaj *retrospiegulo* (*achteruitkijkspiegel*).

Arjen-Sjoerd de Vries

## Oproep voor bijdragen

Elk lid van Esperanto Nederland houdt zich op zijn of haar eigen manier bezig met Esperanto, variërend van het bestuderen van de grammatica, het schrijven van gedichten of andere teksten, tot het ontmoeten van andere esperantisten, fysiek of op sociale media. We roepen je op om je ervaringen met ons te delen. Je verhalen zijn meer dan welkom, zowel in het Esperanto als in het Nederlands. Stuur ook foto's mee. Grammaticale fouten corrigeren we. Inkorten en andere aanpassingen doen we zoveel mogelijk in overleg. Wanneer je wilt, kunnen we ook een interview houden. Neem bij langere teksten eerst even contact met ons op.

Stuur je bijdrage op naar: [redakcio@esperanto-nederland.nl](mailto:redakcio@esperanto-nederland.nl).



## Ekzistas diversaj radio-stacioj, kiuj elsendas en Esperanto

3ZZZ Radio

Ĉina Radio Internacia

Radio Frei

Kernpunkto

Muzaiko

Radio Havana Kubo

Varsovia Vento

Radio Vatikana

Diversmaniere vi povas aŭskulti elsendojn, ekzemple:

- aŭskulti rete: <http://esperanto-radio.com>

- aŭskulti per apo (nur Android): [Muzaiko](#)



Esperanto-radio

Muzaiko





## 28, 29 en 30 april 2023 Esperanto Studieweekend

### Welkom

De voorbereidingen voor het studieweekend op 28, 29 en 30 april 2023 zijn in volle gang. Er zijn ook al aanmeldingen binnengekomen, dus als je verzekerd wilt zijn van deelname, wacht dan vooral niet te lang met je aan te melden!

Onze trouwe deelnemers weten al hoe het programma van het studieweekend eruit ziet. Vrijdagavond komen we aan en is er tijd om bij te praten en kennis te maken. Op zaterdag begint het echte werk in de vorm van een intensief programma van in totaal vijf lessen, van 's ochtends tot in de avond. 's Avonds is er gelegenheid voor ontspanning en gezelligheid, en misschien is er nog een muziekprogramma. Zondag gaan de lessen verder, maar er is ook tijd om te genieten van de mooie natuur van deze regio. Het programma is om een uur of drie 's middags afgelopen.

Er wordt op vier niveaus les gegeven. Bij de aanmelding geef je je niveau op: absolute beginner, bezig met een beginnerscursus, beginnerscursus net afgerond, gevorderde. Het onderwijs wordt verzorgd door kundige Esperanto-docenten uit verschillende landen, dus je zult zeker een hoop opsteken!

Als cursusgebouw hebben we weer het natuurvriendenhuis Krikkenhaar afgehuurd, in de buurt



van Almelo. Dat is ons de laatste paar keer prima bevallen: een mooie omgeving, voldoende slaapplekken, grote gemeenschaps- en lesruimtes, een goed uitgeruste keuken. Tijdens het hele weekend staat de keukenploeg voor ons klaar. Zij zijn maar met zijn tweeën, dus er is wel wat hulp van de deelnemers nodig bij het tafeldekken en opruimen.

We hopen we jullie in groten getale in Krikkenhaar te kunnen verwelkomen!

**Voor wie** Als je nog nooit Esperanto hebt geleerd, of je Esperanto is nog niet zo goed als je zou willen, ben je van harte welkom. Er wordt op verschillende niveaus les gegeven. De nadruk ligt op het oefenen van het spreken in Esperanto in kleine groepen.

**Wanneer** Het studieweekend vindt plaats op vrijdag 28 t/m zondag 30 april 2023.

**Waar** Natuurvriendenhuis Krikkenhaar, Krikkenhaar 11, 7627 PA Bornebroek.

**De kosten** voor dit studieweekend bedragen € 90,- p.p. (leden van Esperanto Nederland en NEJ of andere landelijke Esperanto-verenigingen betalen € 80,- p.p.) In de prijs zijn inbegrepen: lessen, het overige programma, overnachtingen, maaltijden, koffie en thee tussen de lessen door.

**Meer informatie** en het aanmeldingsformulier staan op de website van Esperanto Nederland: <https://esperanto-nederland.nl/studieweekend>

*Ineke, Lilian, Arjen-Sjoerd*

novembro - decembro 2022  
27a ĵarkolekto, n-r 6

# Fenikso

PostNL  
Port betaald  
Port payé  
Pays-Bas